n-ro 38

oktobro 1992

ISSN 0941-9306

Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo

# La Merkato

**Enhavo**


| | | |
|---|---|---|
| Salutoj de la prezidanto | FJB | 3 |
| Ĝenerala Kunveno dum la UK en Vieno – protokolo | dk | 3 |
| Diskutado pri celoj kaj agadoj de IKEF | dk | 5 |
| La vizito ĉe SIEMENS | dk | 6 |
| Bundeswirtschaftskammer (Federacia Komerca Ĉambro) | dk | 8 |
| UK-kunvenoj pri terminologia laboro | RR | 10 |
| Donacoj | RR | 10 |
| Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?* | Ruig | 10 |
| Enketo ĉe la legantoj de la revuo Monato | RR | 11 |
| Publikaĵoj de IKEF | RR | 12 |
| Komercdeziraj leteroj! | dk | 12 |
| Informfluo | dk | 13 |

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

**La Estraro de IKEF:** S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether; S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

**Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo:** Ĉe s-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestraße 8, D-W-7580 Bühl 16, FR Germanio
**Financa sidejo kaj membrara administrado:** Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono: +32.(0)50.330004

**Redaktora sidejo:** Ĉe s-ro Daniel König, Schwarzwaldstraße 47 D-W-6800 Mannheim 1, FR Germanio, telefono: +49.(0)621.821710

**La jara membrokotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ĉiuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.

**Kontoj:** Ĉe UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c, aŭ ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83, je la nomo de IKEF, p.a. S-ro Roland Rotsaert.

**Perantoj:**

*Ĉinio:* S-ro **Wang Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an, Ĉinio
*Francio:* S-ro François-Xavier **Gilbert**, Vert Coteau, F-55000 Longeville en Barrois, (CCP 1275-89 L Nancy)
*FR Germanio:* S-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8, D-w7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)
*Hispanio:* S-ro Pedro Antonio **Macanás Valverde**, Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia, (Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Codorníu", n-ro 672-1; Kotizo: 1250 ptas.)
*Hungario:* D-ro István **Gether**, Palóc u. 1, H-1135 Budapest XIII
*Italio:* D-ro Marco **Picasso**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro
*Japanio:* S-ro Seikô **Yamasaki**, 185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, (Poŝtĝirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)
*Jugoslavio:* S-ro Sotir **Taleski**, ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje
*Togolando:* S-ro Gbeglo **Koffi**, B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé



**Salutoj de la prezidanto**

Estimataj IKEF-anoj,

vi certe miras pri la iom luksa aspekto de nia "La Merkato" n-ro 38; kiun vi havas enmane. Nek estas jubilea jaro de IKEF, nek gajnis ni en loterio. Ni volis nur montri al nia membraro, kiom multe pli bela povus aspekti nia komunikilo en presita formo (... se ni disponus pri sufiĉe da mono), kaj samtempe ni volas prezenti la fotojn el Vieno en rekonebla kvalito. La sekvaj "Merkatoj" ree aperos en la kutima malmultekosta kaj modesta maniero.

Nia agado en Vieno estis sukcesplena. Legu la raportojn pri tio sur la sekvaj paĝoj. Partoprenis en la Ĝenerala Kunveno entute 50 personoj (rekordo!), el tio 19 membroj kaj 31 interesitoj. Ĉeestis ses el sep estraranoj. Dek novaj membroj en Vieno aliĝis. En la vizitoj ĉe la firmao SIEMENS AUSTRIA kaj ĉe la BUNDESWIRTSCHAFTSKAMMER partoprenis 30 personoj. Tie ni liveris pruvon pri bona funkciado kaj utilo de Esperanto en ekonomio kaj ni vekis atenton por nia afero.

Mi esperas, ke ĉio tio donos al ni ĉiuj freŝan elanon por nia agado en la venontaj monatoj. Al tiuj kiuj ankoraŭ demandas kion ili faru, mi memorigas al la listo pri taŭgaj agadeblecoj en La Merkato n-ro 37 paĝoj 3-4. Mi deziras al vi sukcesan agadon dum la venonta vintra periodo.

Kun koraj salutoj

*via Franz Josef Braun*

**Ĝenerala Kunveno dum la UK en Vieno - protokolo**

La jara ĉefkunveno de IKEF okazis en Vieno, kien ĉijare UEA invitis al la Universala Kongreso de Esperanto.

Jen la tagordo:
1) Pridiskuto de la raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1991 kaj de la financa raporto por 1991, ambaŭ publikigitaj en La Merkato n-ro 36 de aprilo 1992;
2) Diskutado pri celoj kaj agadoj de IKEF;
3) Elektoj al la Estraro;
4) Diversaĵoj.

Lunde, la 27an de julio, precize je la 16a horo, la prezidanto Franz Josef Braun malfermas la kunvenon. Li salutas la ĉeestantaron de pli ol 50 membroj kaj interesatoj en la salono Wüster de la tre moderna kaj agrable aerumita

kongresejo. S-ro Braun pritraktas en sia parolado ĉefajn punktojn el la skribita raporto. Grava afero estas la finpreparo de EKOFOMO (= Esperanto-versio de la terminaro "Economie Finance Monnaie" de la Eŭropa Komunumo) fare de la Terminara Sekcio sub kunordigado de s-ro Wiersch. IKEF volas prezenti tiun E-version al EK kun la propono, ke EK ĉe noveldono aldonu E-on kiel dekan lingvon al la naŭ nunaj lingvoj de EK.

La prezidanto bedaŭras, ke la verka agado de IKEF lastatempe iom lamas. Li laŭdas d-ron Goldman,

*Kelkaj bildoj el la ĝenerala kunveno de IKEF.*









Usono, kiu regule monate aperigas sian Ekonomian Bultenon pri Usono, EBU, kaj li invitas kapablajn IKEF-anojn el Eŭropo kaj Azio al verkado de similaj bultenoj pri la ekonomia evoluado en la Eŭropa Komunumo respektive en japanio kaj/aŭ orienta Azio.

Laŭdindaj agadoj en 1991 estis laŭ Braun la du vizitoj dum la UK 1991 en Bergen ĉe la Komerca Altlernejo kaj ĉe la petrolkompanio Statoil, plie la "Ĉinaj Kontaktotagoj" kun esperantlingva simpozio "Ĉinio aktive" en Oostende, Belgio. Laŭdon meritas laŭ Braun ankaŭ s-ro Schubert, Germanio, pro lia kreaĵo Monda Merkato, esperantlingva anoncgazeto. IKEF interkonsentis kun Schubert, ke ni povas uzi ĉi tiun gazeton por aperigo kaj per tio disvastigo de la multaj proponoj/-deziroj/ofertoj pri varinterŝanĝo de Esperantistoj el landoj kun pagoproblemoj.

Kiel resumo pri 1991 la prezidanto akcentas, ke kvankam evidenta sukceso, IKEF kun siaj 102 membroj devus montri pli da agemo. Li montras taŭgajn agadeblecojn por IKEF-anoj kaj avertas pri troa diskutado pri nerealismaj celoj. "Ĉiu de ni prefere faru malgrandajn sed realigeblajn paŝojn proksime al sia profesio aŭ ĉiutaga laboro", diras Braun.

Sinjoro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto de IKEF, detale klarigas la financan raporton same aperinta en La Merkato n-ro 36. Li parolas pri financa gajno en 1991 de 6835 belgaj frankoj (kompare al defizito de 4954 BEF en la antaŭa jaro). S-ro Rotsaert mencias ricevitan donacon pri 20000 BEF de industriulo kaj konstatas sanan financan staton de IKEF.

Ambaŭ raportoj estas aprobataj de la ĉeestantaj membroj. Jen temoj de la sekva

**Diskutado pri celoj kaj agadoj de IKEF:**

S-ro Cwik demandas pri la "vendada" strategio de IKEF rilate al EKOFOMO al EK (Europa Komunumo). Ĉu tio eventuale gajne ligeblas al la projekto DLT (Distributed Language Translation) kiu ja estas monrimede subtenata de EK?

S-ro Georges Sossois rimarkas ke "la projekto IKEF" sin turnu al ne-Esperanto-parolantoj (komercocele). Li opinias ke kontaktigi tiuj jam E-parolantoj povas esti nur la unua paŝo kaj demandas ĉu ekzistas iuj komerc-ĉambraj projektoj rilate al Esperanto. Respondon donas s-ro Francois-Xavier Gilbert. Li trovis Esperanto-kurson por Ekonomistoj kaj pretas sendi kopion de tio al Sossois. S-ro Gilbert mem sukcese instruis Esperanton al gelernantoj je komerc-ĉambra lernejo.

S-ro Chenru rakontas pri Ĉinio, kie ankaŭ li provas instrui Esperanton al Ekonomiistoj. Kun s-ro Valente li jam priparolis la eblecojn fari ekspozicion en itala urbo. Pro tio li nun planas viziti la prezidanton de la komerca ĉambro por pritrakti tion.

S-ro Pospiŝil invitas al la kunveno de TEC (Terminologia Esperanto Centro) al salono Baghy venonttage. Tie oni prezentos Paradox, komputilan programon por terminologia laboro, matene, inter la 9a kaj la 11a teorie, posttagmeze inter la 14a kaj la 17a praktike. IKEF tie estos reprezentata de s-ro Rotsaert. Ke tio kampo por IKEF speciale gravas, evidente videblas per la eldonaĵoj faritaj dum la lastaj jaroj.

S-ro Gilbert demandas la ĉeestantaron pri ebla ĝemeliĝo de alia (eventuale eĉ komerc-ĉambra) lernejo al la sia. Por liaj junaj gelernantoj estus tre pozitive, se ili povus kontakti esperantlingve samideanojn eksterlandajn.

S-ro Braun sciigas kaj invitas al la plej gravaj aranĝoj por IKEF je la ĉijara Universala Kongreso, la vizitoj de la kompanio SIEMENS kaj de la Bundeswirtschaftskammer (federacia komerca ĉambro) de Aŭstrio.

S-ro Baki Imre bele diras: "Ni pruvu videble ke Esperanto estas utiligebla kaj utiligata."

S-ro László Szilvási, redaktoro de la nova gazeto Eventoj, ofertas ke eblas krome enmeti apartan paĝon aŭ eĉ kajeron (al lia gazeto) pro ekonomiaj aferoj je kiu oni raportu pri IKEF kaj ISAE. Prave li mencias ke instrui sole sufiĉas por ligi instruistojn. Kiamaniere ni trovu kontaktojn eksterlande - ne nepre Esperantlingve. [En n-ro naŭ de Eventoj jam aperis unufolia (A4) suplemento kiu tutpaĝe okupiĝis pri IKEF, krome al la du trionoj de la paĝo tri kiuj sin dediĉis al niaj aferoj. Fakte estis (tuta) represo de nia bulteno.]

S-ro Sossois ŝatas organizi kunvenon de EEU kaj IKEF paske 1994.

S-ro Cwik, kiu jam verkis artikolon pri lingvaj kostoj demandas: "Kiu konas personon, kiu demandis pri la kostoj enmeti nia lingvo Esperanto en la etajn tradukmaŝinojn".

S-ro Schubert serĉas tradukistojn/eldonistojn por multlingvaj "mondaj merkatoj". Li raportas, ke venis tri kontaktpetojn pro la anonco pri nova dizela motoro.

La tria punkto de la tagordo estas elektoj al la estraro. Finiĝas la oficperiodo de s-ro Braun, kiel prezidanto kaj de d-ro Picasso. S-ro Hans Welling transprenis la taskon gvidi la elektoprocedon.

Kiel prezidanto s-ro Braun pretas kandidatiĝi. Aliaj kandidatoj ne estas prezentataj. S-ro Braun estas unuanime reelektata. D-ro Picasso (ne ĉeestante) ne plu kandidatiĝas kiel estrarano. Al la demando de s-ro Welling pri alia kandidato, neniu pretas kandidatiĝi. Do, novelekto de vaka estrarposteno ne eblas.

Laŭ deziro de unuopuloj oni cirkuligis apartan partoprenliston por tiuj kiuj pretas esti kontaktotaj kiel ĉeestintoj. Jen nur la kongresaj numeroj (ĝusteco ne estas garantiata): 29, 130, 141, 194, 264, 268, 373, 462, 463, 529, 650, 1531, 1557, 1602, 1604, 1869, 2048, 2137, 2309, 2517, 2557, 2644, 2700, 2796, 2843, 2849, 2928.

## Vizito ĉe SIEMENS AŬSTRIO

La kongresa ĵaŭdo, la 30a de julio, estis kroma ekskursa tago por IKEF-anoj kaj interesatoj. Ni atingis buse la firmao SIEMENS, kie salutis nin s-roj Kerman kaj Schellander. Oni prezentis multajn informojn, speciale interesa la kompania kampo de AV-Sistemoj (Audio/Video). Mondvaste SIEMENS Aŭstrio pretendas pro la gvida rolo je tiu kampo de profesia ekipaĵo por televidaj elsendejoj, radiostacioj kaj kongresejoj. Kie AV-teknikoj lokfiksite aŭ mobile estas bezonataj, SIEMENS laŭdezire produktas ilin. La referenzlisto montrita estas impone longa kun multaj konataj institucioj. Sed tiu kampo nur estas unu el la sep reprezentataj en Austrio. Inter aliaj oni produktas medicinteknikon, semikontaktorojn kaj teknikaĵojn por aŭtomobiloj. La centraj servoj de SIEMENS estas financado, esploro, personal-divizio, produktado kaj materialmastrumado kaj finfine la entreprena planado. Plej interesa - eble speciale por la ĉeestantoj el la ekssocialismaj landoj - la eldiro de la SIEMENS-sinjoroj: "En la oriento ankoraŭ apenaŭ estas merkato, sed potencialo. Aktuale ni konstruas uzinojn kaj preparas nin, sed tio ankoraŭ bezonas sufiĉe multe da tempo."

La tradukado el la germana al Esperanto dum la prezentado bone prizorgis s-ro Rainer



*Dum la fabrikrigardado ĉe Siemens; Gvidantoj de Siemens kaj parto de la vizitantoj.*







Heckhausen.

S-ro Schneeweis kaj Wieninger gvidis nin tra uzino kie oni produktas por komputilojn por la firmao Tandon. Plejparte temas tie pri muntada laboro de elektronaj komponentaroj. Post tiu interesa produktadmontrado oni invitis nin al tagmanĝa bufedo.

La buso portis nin pli ol nur ĝustatempe al la administrejo – impona domo – de la

**Bundeswirtschaftskammer (Federacia Komerca Ĉambro de Aŭstrio).**

Dr. Farnleitner, vica Ĝenerala Sekretario de tiu institucio, volonte akceptis niajn demandojn kaj respondis profunde. Li ofte tiele funkcias. "Antaŭhieraŭ venis reprezentantoj de la norda ĉinio kaj hieraŭ li salutis la ambasadoron de Bulgario kaj la parlamentan prezidanton de Irano", rakontis li.



*En la salono de la federacia komerca ĉambro (Bundeswirtschafts-kammer): Prezidanto Braun (meze) dankas al d-ro Farnleitner, vica Ĝenerala Sekretario de la BWK (dekstre sidante) pro ties informoj al la vizitantoj.*

Krom la federacia ĉambro ekzistas naŭ landaj ĉambroj. Federaciaj kaj landaj ĉambroj estas plie fake dividitaj laŭ ses branĉoj, nome metio, industrio, komerco, mono/kredito/asekuro, trafiko kaj turismo.

La federacia ĉambro organizas kursojn, ĉirkaŭ 1500 jare por 250.000 "plenkreskitaj" gelernantoj. Tiu spegulas 10 % de la aŭstria profesie aktiva popolo. Aliflanke helpas la ĉambro per 90 eksterlandaj komercoficejoj en 85 landoj. Baldaŭ oni malfermiĝos oficejoj en Kiev, Alma Ata, Bilissi kaj Shanghai. Ekonomia subteno kaj ekstera komerco estas tasko de la federacia komerca



ĉambro. Kiel helpan funkcion ili agas en la tarifa aŭtonomio, ili parolas pri sociala partnereco. Se la inflacio tro kreskas, la tarifkontrakto validas malpli longe. Pro ĉi tiu sprita regularo strikoj ne kutimas en Aŭstrio. Tiujn aferojn pritraktas la egalparta komitato (Paritätische Kommission). Ĝi konsistas el la komitato pri prezoj, el la komitato pri salajro kaj la konsilio. La aktuale plej grave traktita temo estas la demando, kiamaniere certigi la "pensionpagado" post la jaro 2005. La koncerna konsilo laŭdire momente estas: Aŭstrio akceptu 25.000 enmigrantojn, eĉ kontraŭ la popola konscio. Aliaj temoj de tiu komisio estas la pritraktado de rubaĵo aŭ la konsekvencoj de la ekonomia kaj politika malfermo de la iame socialismaj landoj.

La budĝeto de la tuta institucio estas 3 miliardoj da aŭstraj ŝilingoj. Deĵoras 1200 personoj por ĝi.

La federacia ĉambro sin financas per kvin fontoj. Unue, ili ricevas fiksan percentaĵon, 0,03 %, de ĉiuj fakturoj; due membrokotizojn; trie kotizojn por servoj, kursojn ktp; kvare statajn subvenciojn por la plenkreskula edukado; kaj kvine interezojn.

D-ro Farnleitner certas, ke la komuna merkato de la EK (Europa Komunumo) nepre estos avantaĝo por Aŭstrio. Limoj forestos. La transiro de limoj hodiaŭ kostas 2-3 % de la fakturo kaj krome daŭras la transportoj pli longe. Oni konsideru ke 2/3 de la ekstera komerco rilatas al EK-landoj. Aŭstrio estas lando, kiu pleje plenumas la postulojn por membriĝo al EK, li asertas.

La prezidanto de IKEF, s-ro Franz Josef Braun, kiu prizorgis la tradukon el la germana linvo en Esperanton, multe dankas al d-ro Farnleitner pro la akcepto kaj riĉa informo. Li transdonis al li kiel memoraĵo ekzempleron de Komerca Terminaro (kun Esperanto).

/dk

## UK-kunvenoj pri terminologia laboro

Dum la Universala Kongreso okazis kelkaj kunvenoj pri terminologio. Veraj novaĵoj ne estis, ĉar la aktiveco de TEC (Terminologia Centro de UEA) en Zagreb, Jugoslavio ĉesis. Ĝian taskon transprenis inĝ. Jan Pospiŝil (Ĉehoslovakio). Li projektis por TEC datumbazan sistemon surbaze de la programoj MultiAlphabet kaj Paradox. Mi ankoraŭ atendas detalajn informojn kaj esperas raporti pri tio en venonta numero.

D-ro **Budding** klarigis la rolon de Vieno kiel centro por internacia kunlaboro en kampo de terminologio. Ĝi ja estas sidejo de i.a. Infoterm kaj Termnet.

D-ro **Brendt skizis la signifon de Eugen Wüster kiel terminologo kaj esperantologo.**

**Detlev Blanke** (Otto Nagel Str. 110, Pf. 113-05, D-O-1141 Berlin) en sia prelego substrekis bezonon je bibliografio de fakaj tekstoj.

D-ro K.H. **Simon** (C.v. Ossietsky-Str. 21, D-O-1300 Eberswalde-Finow) prezentis projekton de multlingva Vortaro de Forsta Fako ("Lexicon Silvestre").

D-ro Lev V. **Medvedev** (pr. Mira 196-44, RUS-129128 Moskva) serĉas kunlaborantojn por ekologia terminaro.

## Donacoj

Anonima 20.593 BEF

Ian Jackson (Britio) 590 BEF

Komerca Ĉambro Bar-le-Duc (Francio) 236 BEF

IKEF dankas al la donacintoj!

/RR

## Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?

LINGVO ne estas celo (nur kiam oni studas ĝin literaturcele), sed ilo, komunikilo.

Edukado-instruado komplikiĝas: oni devas studi tro multe da fakoj, sed mankas tempo. Eŭropanoj ofte ne tiom perceptas tion, ĉar studo de alia eŭropa lingvo ne estas tiom malfacila por talentulo, sed por ĉinoj kun sia tute diferencstruktura lingvo tio estas grandega problemo. Estas severa handikapo kaj tiel rezultas en diskriminado: en la komunikado, en la negocado. Tio estas neakceptebla situacio.

Zamenhof semis, la Esperanto-movado flegis, verdigis la planton. Nun venas la horo de la vero: la tempo por rikolti. Ĉu la planto portas fruktojn?



Multaj ĉinoj, sed ne nur ili, lernis la Internacian Lingvon pro praktikaj celoj. Kaj nun ili sin prezentas: "Ni volas rikolti." "Ni volas apliki Esperanton en ekonomio, komerco, aplikata scienco, tekniko."

Kaj nun montriĝas, ke Eŭropo, la lulilo de Esperanto, la sidejo de UEA, ne estas tiom progresinta. Ni ne estas pretaj! Ni ne bone faris nian taskon.

Kiel sonas unu mano aplaŭdanta?

La lingvo ne kulpas. Vi en Ĉinio faris la ĝustan elekton. Sed ne faru nian eraron; ne estu tro moderaj. Esperanto travivis jarcenton sukcese; ĝi pruvis sian utilon.

Postulu de viaj partneroj la aplikon de la Internacia Lingvo. Se ili ne volas kunlabori, donu al ili elekteblon: vi lernu aŭ Esperanton, aŭ la ĉinan. Donu pli favorajn negockondiĉojn al komercpartnero, kiu pretas negoci ĉu en Esperanto ĉu en la ĉina.

Postulu de UEA ke ĝi sekvu vian filozofion.

IKEF jam penas sed bezonas helpon.

Ĉina Aktiveco en Oostende montras ke vi pravas. Vi elektis la ĝustan lokon por via prezentado: Benelukso esta la 4-a ekonomia potenco en la mondo, post Usono, Germanio kaj Japanio, kaj en Belgio naskiĝis kaj loĝas la E.K., ido de Benelukso.

Ĝi estas la ĝusta loko por montri ke ekonomia komunumo, celante internacian komercan kunlaboron, signifas ankaŭ aplikon de komuna lingvo, ne nur ene de la EK, sed speciale ekstere, precipe al nia partnero de la estonto: Ĉinio!

Kees Ruig, Nederlando

* La artikolo estas parolado de la aŭtoro en la Esperanto-simpozio kadre de la ekspozicio de la ĉinaj industriaĵoj (Ĉinio aktive) organizita en Oostende, Belgio, oktobre 1991.

## Enketo ĉe la legantoj de la revuo Monato

Dum la monatoj majo ĝis julio Flandra Esperanto-Ligo enketis ĉe la legantoj de la revuo Monato. Revenis 230 enketiloj, tio estas pli ol 10 %. La respondoj estas prilaborataj kaj aperos en la venontaj numeroj de la revuo.

Detaloj de la analizo (ekzemple por varbi anoncojn) estas haveblaj ĉe la eldonejo aŭ ĉe RR.

Kvankam estas malfacile esti tute certa pri tio, unua impreso estas ke malmultaj membroj de IKEF abonas Monato-n, kvankam ni ĉiam argumentas, ke Monato estas nia bazo kaj tribuno por fakaj artikoloj pri ekonomio. Reciproka anoncado do povus esti konsilinda.

/RR

**Publikaĵoj de IKEF**

Post kelkaj monatoj venos la momento por pagi vian kotizon por 1993.

Eble vi profitu de tio por samtempe mendi eldonaĵon de IKEF?

- Proveldono de Komerca Terminaro (1989) 450 BEF
- EKOFOMO, Esperanto-versio de Economie Finance Monnaie (1992) 350 BEF
- same, sur disketo (en Word Perfect 5.1 kaj ASCII-formatoj) 200 BEF
- IKEFidentecŝildaro (1992)150 BEF
- Kiu faras kion? (1992 - K.Ĉ. Bar-le-Duc, Meuse' Francio) 250 BEF

La menciitaj prezoj inkluzivas sendkostojn.

/RR

**Komercdeziraj leteroj!**

**Komercajn kontaktojn serĉas:** studento pri internacia ekonomio kaj komerco: S-ro Jarek Bender Senefelder Straße 19, Dw7312 Kirchheim/Teck

**Silezia Esperanto-Asocio** fondiĝis ĉi jare. Inter alie oni intencas komerci. Pliaj informoj je: ul. Dubois 3, P.O.Kesto 16, PL 50-952 Wroclaw 17, Tel/Faks: +48(71)226954

**Techno-Ratio, Hungario,** pretas helpi je aranĝado de fondiĝo de firmao, preparo de kontraktoj kaj regularoj, konsilado pri impostado kaj socia asekuro, librotenado, administrado de entreprenoj, akiro de kredito kaj negocperado. Esperantlingva komisiito de tiu firmao estas s–ro Imre Bajáki, Kishunfélegyháza, Dr. Holló Lajos u. 61, 6100 Hungario, telefakso: +36.76.62.551; aŭ rekte al la firmao: Techno-Ratio KFT, dr. András Máté, direktoro, aŭ Lászlo Váradi, aferestro, Kecskemét, Kisfaludy u. 6-8, 6000, Hungario, telefono: +36.76.29.844-19, telefakso: -13

**Aŭtoturisman vortaron** en ses lingvoj kaj konversacian libreton kun reklamo de hoteloj, vendejoj kaj porturistaj servoinformoj eldonos la Agentejo SORTIMENTO, s-ro Imre Bajáki, 6100 Kishunfélegyháza, Pf.: 138, Hungario, telefaksoj: +36.76.62.551, +36.76.42–004, -006

**Investu en Ĉinio,** petas Shi Yong-ning, Gongwai, Shida, Shijiazhuang, Ĉinio. Informojn tie.

**"Specialan Ekonomian Distrikton"** malfermis lastatempe la registaro de Nanchang. Perado kaj multflanka helpo ofertas EPĈ Informagentejo, Cao Xionglin, xi hu lu 72 hao, Nanchang, Jiangxi 330003, Ĉinio, telefonoj: +86.(0)791.222901, 66137.

/dk

**Kunajn investojn en turismaj restadejoj kaj uzinoj de hejmaj elektroaparatoj** (japanaj) proponas s-ro Han Yao-hua, Wuhan Shi Wuchang Xian, Linfang Gongxiaose, CN-40205 Ĉinio.

**Kurson pri librotenado kaj financa administrado** deziras sekvi esperantisto 2–jara el Niĝerio.



Ĉar li ne estas allasita en universitato, li devas studi hejme. Kiu fakulo (prefere anglalingvano, ĉar kurslibroj estas en angla lingvo) pretas helpi lin en studado ? Adreso: Evaristus Attah, P.O. Box 24, Nsukka, Enugu State, Niĝerio.

**Ĉina kompanio TONGHE** utiligas Esperanton en sia agado. Ĝi ofertas: makleran servon, informan servon, edukan servon, enkondukan servon kaj vizitservon. Adreso: TONGHE Kompanio, Chuzhou Lu 210 Hao, Joaoyu Dasha, CN-20011 HEIFEI; telefono/telefakso: + 86 551 250 241.

**Elektromedicinajn aparatojn, turismajn aranĝojn** (Nigra Maro, Monto Vitoŝa (ĉe Sofio), Istanbulo) proponas firmao Mini Max Business, Bl. 16 A, apt. 58, Gen. Stoletov Blvd., 12 SOFIO, Bulgario; tel. 0059-2-114, fakso 0059-2-88549.

**Haitia Esperantista Junulara Asocio** deziras distribui farmaciajn produktojn, aŭtomobilajn partojn k.a. Adreso: S-ro Adrien Luzincourt, 4 rue J. Janvier, Port-au-Prince, Haitio.

**Porcelanon, biciklojn, tekstilproduktan maŝinaron** proponas s-ro Wei Wei Ho, Hunan Provincial Machinery & Electronic Eq. Co., 6/F, 85 Tian Xing Road, Chansha; telekso 982049, fakso 01-444445.

**Informfluo**

Laŭ opinio de s-ro Inĝ. Tammo Kanter (frupensiisto) la Esperantlingva komerca informfluo nepre estas plibonigenda. Certagrade grava temo. En pluraj eldonaĵoj aperas unu-foje, unuope' unuopaj anoncetoj kaj informoj pri komercaj deziroj. Kiel efektivigi la disvastigon de tiuj informoj? Nepre diskutenda. En la gazeto Eventoj n-ro 8 (junio 1992) invitis s-ro Kanter ke oni pripensu tiun temon. Kelkaj reagis perletere. Kiu emas ankoraŭ skribi, jen la adreso: Tammo Kanter, Ten Utlodreff 24, 7921 HP Zuidwolde Nederlando

/dk

**Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!**

S-ro Ilija Andreev (IKEF 152), P.K. 120, BG-9700 CUMEN, Bulgario

Inĝ. Genĉo Tzokanov (IKEF 153), MINI MAX B, bul. "Gen. Stoletov" bl. 16A apt. 58, BG-1235 SOFIA, Bulgario

S-ro Joakimo Verdeno (IKEF 154), Pionierow 6 A 9, PL-47-220 KEDZIETZYN, Pollando

S-ro László Kócsó – World Contact Ltd (IKEF 155), Imre Gábor u. 9. Pf. 431, H-6000 KECSKEMÉT, Hungario

S-ino LI Renzhi (IKEF 156), Holsteinener Weg 7, D-W-4799 BORCHEN, Germanio

S-ro Aldo Viotto – Triesta E-Asocio (IKEF 157), via Alpi Giulie 19, I-34149 TRIESTE, Italio

S-ro Giuseppe Valente (IKEF 158), Viale Ledra 4, I-33100 UDINE, Italio

S-ro Wieslaw Klak (IKEF 159), Wysoka Kancucka 153, PL-37-100 KANCUT, Pollando

S-ino Zofia Szczepan (IKEF 160), ul. Putaskiego 9/215, PL-35-011 RZESZCW, Pollando

S-ro Alfredas Maruŝka (IKEF 161), p.k. 50, LIT-5250 PASVALYS, Litovio

S-ro Marcos Cruz (IKEF 162), Acacias 44 (Monteclaro), E-28223 POZUELO DE ALARCON, Hispanio

S-ro Cao Xionglin – Nanchang-a Informservo (IKEF 163), 330008 Min de lu 140 hao, NANCHANG, JIANGXI, Ĉinio

S-ino Tu Xiuli (IKEF 164), Dingxi Nanlu 276 Hao, Lanzhou, Gansu 730000, Ĉinio

S-ino Shi Xue Gin (IKEF 165), He bei jie 31-1 Hao, Zhen giang' Jiang Su 212001' Ĉinio /RR/dk

**Subskribintoj respondecas** pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

**La rajtoj de represo** estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

**Reklamtarifoj,** en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; 1/2 paĝo 900; 1/4 paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

**Akiri anoncojn** estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: finance kaj reputacie. /dk

®
World-
Contact

**Estimataj Gesinjoroj!**

La celo de nia firmao estas la akcelado de informfluo pri ofertoj kaj serĉoj, vigligo de la kapitalmerkato kaj merkato ĝenerale.

Ni ŝatus doni eblecojn por investemaj kaj komercemaj eksterlandaj firmaoj, interesiĝantaj pri Hungario kaj landoj de Orienta Eŭropo, por ke ili povu kontaktiĝi kun partneroj havantaj konfideblajn referaĵojn.

Niaj servoj uzas preskaŭ 1 000 hungaraj firmaoj, kontraŭ jara kotizo.

La negocaj ofertoj de niaj partneroj estas troveblaj ne nur en nia indik-banko, sed ankaŭ en nia semajn periodaĵo „Business Plus" aperanta en po 20 000 ekzempleroj, per kies helpo atingas tutlande plurmil firmaojn, entreprenojn.

Por firmaoj, entreprenoj interesiĝantaj pri hungaraj negocaj kontaktoj, ni certigas senpagan aperon en nia indik-banko, kaj en nia periodaĵo „Business Plus". Ni atendas viajn ofertojn pri importo-eksporto, libera kapacito, servoj, investo, kaj serĉo de negocpartneroj.

Viajn informojn vi povas sendi al ni en lingvoj angla, germana, Esperanto, rusa.

La negocaj ofertoj de niaj enlandaj partneroj po 1 foje monate aperas en nia anglalingva periodaĵo „Business Plus", kaj senpage alvenas al komercaj ĉambroj en 50 landoj kaj al partneroj, kontaktiĝantaj kun nia indik-banko.

Ni esperas, ke nia informilo vekis vian afablan interesiĝon pri tiu ĉi eksterordinara ebleco, kaj baldaŭ ni povas saluti viajn informojn en nia indik-banko. En la espero de sukcesa kunlaboro ni estimplene salutas vin:

Kócsó László,
direktoro



(paĝo 15 estas blanka)